N. N. 52,

# Münsterlied

Wo die blaue Werse durch die Gegend schleicht,
wo so manches Mädchen sich die Haare bleicht,
wo man trinkt die Halben in zwei Zügen aus,
da ist meine Heimat, da bin ich zu Haus.

Wo von Sankt Lamberti noch der Türmer bläst,
wo man, wenn's nicht regnet, Glocken läuten läßt,
wo man schon um zehn Uhr macht die Lampen aus,
da ist meine Heimat, da bin ich zu Haus.

Wo am Prinzipalmarkt schöne Mädchen gehn,
wo bei Pinkus Müller sich die Kräne drehn,
wo der Kiepenkerl die lange Pfeife raucht,
da ist meine Heimat, da bin ich zu Haus.

Wo die dicke Marktfrau preist die Äpfel an,
wo man in dem Schloß sogar studieren kann,
wo „Professor Landois" über'n Aasee saust,[5]
da ist meine Heimat, da bin ich zu Haus.

Wo ein ganzes Jahr man treu sein Mädel liebt,
wo man Körnchen trinkt und fleißig Kegel schiebt,
wo man aus der Altstadt schmeißt Betrunk'ne raus,
da ist meine Heimat, da bin ich zu Haus.

Wo auf vielen Pättkes man den Bürger sieht,
wie er fröhlich radelnd seiner Stadt entflieht.
Da zieh' ich die Bremse und da steig' ich aus.
da ist meine Heimat, da bin ich zu Haus.

. . .

N. N. 52,

# Monastera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kie fluas lante Verso tra l' kampar',[4]
kie blonda estas ina kap-harar',
kie oni glutas multe da bier',
tie estas mia hejmalanda ter'.

Kie blovas nokte de l' Lamberta tur'
la gardist' kaj sonas sonoriloj nur,
kie preskau ĉiam estas pluv-veter',
tie estas mia hejmalanda ter'.

Kie promenadas sur la foirej'
Belulinoj kaj en la bier-gastej'
trinkas la bieron de l' urb' Monaster',
tie estas mia hejmalanda ter'.

Kiel laŭte vokas foirej-virin'
kaj ŝip-veturado amuzigas nin,
kie povas studi en kastelo vi,[6]
tie naskiĝinte estas hejma mi.

Kie inon amas oni eĉ dum jar',
kie brandon trinkas tuta urbanar',
ebriulojn punas oni kun sever',
tie estas mia hejmalanda ter'.

Kie biciklanta estas ĉiu hom',
kaj ne volas resti en la propra dom',
tie mi eliras, tie restas mi;
ĉar mi vere ŝatas tiun urbon ĉi.

. . .

[4]„Verso", germane „Werse", estu la Esperanta nomo de la rivero, kiu fluas ĉe la urbo Münster en la pli grandan riveron Amiso, germane: „Ems".

[5]Professor Landois" war wahrscheinlich der Name eines Schiffes, das nach dem Gründer des Münsterschen Zoos, Professor Landois, benannt worden war. / „Profesoro Landois" estis verŝajne la nomo de ŝipo, kiun oni nomis laŭ la nomo de la fondinto de la Monastera zoologia ĝardeno.

[6]aŭ:
kie oni povas studi en kastel',
tie estas mia hejmalanda ter'.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 52.*

*Arg-806-1616 (2013-01-31 21:42:41)*

*Zu singen ist das Lied nach der Melodie des bekannten plattdeutschen Liedes „Wo die Nordseewellen trecken an den Strand“ (eigentlich „Mine Heimat“ von Martha Müller-Grählert. Siehe:* `http://www.felix-krause.de/mine_heimat.htm`.

*Traduko de la Germana poemo “Münsterlied” de N. N. 52 en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-806-1617 (2013-01-31 21:47:21)*

*Kantebla estas la poemo laŭ la melodio de la konata plat-germana kanto „Mine Heimat“ de Martha Müller-Grählert. Vidu la retejon* `http://www.felix-krause.de/mine_heimat.htm`